Anstataŭanto de

# La Juna Vivo

Organo de la Tutmonda Esperanto Junular-Organizo
Aug., Sept., Okt. 1955

## L A N O V A D O M O

Se iu volas konstrui domon, li bezonas du aferojn: Unue la terenon, kaj due la financojn, au krediton. TEJO konstruas novan domon. Ĉu ni havas ĉion? La terenon? La financojn? - Nia tereno estas la tuta mondo; ĉie ni havas rajton kaj volon konstrui. La financoj mankas, sed ni havas multe da kredito, morala kredito, ni ankau povas nomi ĝin bazitan esperon.

Nia kredito estas la estonta geidaro. Se ni ĉiam povas montri iom da sukceso en nia laboro, ni ankau ricevos iom da mono de publika mano; kaj kiam niaj laborantoj ree havas iom da mono, ili jam denove laboras! Jes niaj laborantoj.

Jam de la unua komenco ili laboris kaj multe progresigis nian movadon. Pripensu, ke komence ja nur estis unu semero, kaj el ĝi kreskis post multa kaj daura laboro la bela floro, nia TEJO de hodiau.- Sed nun nia gelaborantaro plijuniĝis, noviĝis, plifortiĝis. Povas esti, ĝi eble ne havas tiom da spertoj, sed des pli da bruliga fajro, des pli da freŝa vento, kiuj estas la plej esencaj por junulara movado.

Ĉiun el niaj funkciuloj mi rigardas kiel portantan portikon, sen kiu ne povus ekzisti la domo. Kaj ĉiun el nia anaro mi rigardas kvazau pecon de la muro, sen kiu la domo havus truon, kaj sen kiu la portikoj ne havus valoron. Tio estas la pasiva aspekto. La aktiva estas jena:

La funkciuloj estas tiuj, kiuj konstante kaj nelaceme laboras je nia domo, ekstere kaj interne, ke ĝi ĉiam pli beliĝu, ĉiam pli imponu, ĉiam plifortiĝu. Ili laboras rekte en kaj el TEJO.

La anoj estas tiuj, kiuj daure kaj seninterrompe alportas la materialon por la domo, novan materialon, novajn anojn, novajn grupojn.
Junularmovado neniam rastas, ĝi daure moviĝas, daure renovigas, daure ŝanĝiĝas. Se tio ne okazas, ĝi ne estas vivoforta junularorganizo.

Eble Vi demandas ankoraŭ pri la celo? - Nia domo estos finkonstruita, kiam ĉiu junulo, ĉiu junulino sur la tero parolos nian internacian lingvon. Tiam ni povos fini nian nunan laboron kaj eniri la domon, pri kiu ni ĝis nun nur tre malgrandparte disponas dum niaj Internaciaj Kunvenoj.

Sincere dankante al ĉiuj antaŭlaborintoj mi ankoraŭfoje alvokas la novan estraron, la funkciulojn, la ĉefperantojn kaj perantojn kaj fine - ne laste - ĉiun unuopan an(in)on al diligenta, daŭra kaj celkonscia memstara Kunlaboro, sed ĉiam en la ĝusta, por li (ŝi) konvena medio, apogante la pli altan funciulon!

Vin ĉiujn, karaj gelegantoj, mi tre kore salutas!

Reiter Heinrich p.m..
Prezidanto

- o : 0 : o -

PROTOKOLO PRI LA JARKUNVENO DE TEJO, OKAZINTA LA TAGOJN
10an KAJ 11an DE AUGUSTO 1955

Unua Kunsido: Komenciĝas je la 10,25a sub la prezido de s-ino B u r g l e r ; ĉeestis proksimume 60 kongresanoj.
Oni legis leteron de nia prezidanto Roel K r a e f f t per kiu li salutas la kunvenon, samtempe eksiĝante el sia posteno.
TAGORDO: 1e Lego de salutleteroj;
2e ĝeneralaj raportoj;
3e Raporto de la perantoj;
4e ŝanĝo de la statutoj.
S-ino Burgler parolas pri la financoj kaj la plendoj de s-ino Van Veenendaal. Ŝ atentigas, ke la tuta dokumentaro devos esti trarigardata. Sekvis la raportoj de la perantoj el Francujo, Nederlando, Danlando, Austrio, Svedujo, Italio, Berlino kaj Parizo.

Sume TEJO havas 613 membrojn en 26 landoj. S-ino Burgler raportis pri resta librostoko de la TEJO-libroservo kaj anoncas, ke oni ne plu instalas novajn librojn.
Tibor Sekelj raportas mallonge pri siaj spertoj rilate Esperanton en Grekujo, kie la movado tute ne ekzistas. Li anoncas restarigon de la tiea movado.
S-ro Boriŝa laŭtlegas siajn proponojn por nova regularo.
La kunsido finiĝas je la 12,15a horo.

Dua Kunsido: Komenciĝas je la 14,3oa sub prezido de s-ino Burgler. S-ro Sekelj salutas la kunvenon flanke de s-ro Lapenna kaj de UEA. S-ino Burgler memorigas pri la kontrakto inter TEJO kaj UEA, kiu nun ne plu funkcias. S-ino Haudebine salutis la kunvenon en la nomo de la ĝenaj esperantistoj.
La kunveno coĉonis kaj decidis, antaue novigi la regularon kaj nur poste ŝanĝi la estraron. Estis elektita komisiono por la gvidado de la jarkunsido, konsistanta el: Boriŝa, Reiter, Ciliga.
De nun S-ro Boriŝa prezidas ĉiu kunvenojn. Li komencis per la ŝanĝo de la reguklaro ĝis la paragrafo 10.
La kunsido finiĝis je la 17,3oa horo.

Tria Kunsido: Komenciĝis je la 9a. Oni finis la revizion kaj ŝanĝojn de la statutoj, kiuj konsistas el 15 Par.
Fino de la kunsido: 10,10a horo.

Kvara Kunsido: Komenciĝas je la 14,3oa. La ŝanĝita regularo estas akceptita. Poste oni transiras al novelekto de la estraro:

Prezidanto: REITER Heinrich, Austrio
Vicprezidanto: BRONZETTI Giorgio, Italio
Sekretario: ~~MINNAJA Nicola, Italio~~
Kasisto: PEYRAUT Yvo, Francio
Dua kasisto: ERRIEN, Francio, au alia lau decido de Peyraut
Ĉefredaktoro: B U R G L E R E., s-ino, Nederlando
Administranto: VAN SPENGEN Corry, Nederlando
Helpredaktoro: MARKOVIC Milan, Jugoslavio
Ĝenerala Kunvena Sekretario: BORIŜA Miliĉeviĉ, Jugoslavio, lau sekvonta informo.

Funkciuloj:

Propagandservo: CILIGA Paul, Francujo kaj
BORSBOOM Eddy, Nederlando

Vojaĝservo: REITER Heinrich, Austrio

Informservo: MINNAJA Nicola, Italujo

Kultura vivo: HAUDEBINE Madeleine, Danujo

Revizia Komitato: VAN MOORST Ben, Nederlando
HOPFENMÜLLER Ar[illegible], Germanujo
PIETRI Lucien, Maroko

Honora Tribunalo: BORIŜA Miliĉeviĉ, Jugoslavio
SEKELJ Tibor, Anglujo
MARINUCCI Giorgio, Italio

Ĉefperantoj:

Francujo: GILLOTEAU s-ino
Maroko: PIETRI Lucien
Nederlando: WALLENBURG A.
Germanujo: KRÜGER Hubert
Austrujo: REITER Heinrich (provizore)
Danlando: BRODERSEN Jörgen
Italujo: MARINUCCI Giorgio
Saarlando: BEKKER s-ro (prov.)
Hispanujo: MOLERA s-ro
Svedujo: ANDERSEN Arne
Jugoslavujo: RAVŜELJ Jana
Anglujo: REES f-ino

Oni priparolis la venontan kongreslokon kaj konigis ok diversajn invitojn. Germanujo estas elektita kiel kongreslando, la urbo elektita: Büsum. Tamen oni decidis [illegible]e la cirkonstancoj pli favoras kunveni en Danlando. - Pr[illegible] la kulturkomisiono zorgu la estraro kaj OKK.- Kun la taskoj de la kontrolkomisiono oni ŝarĝis la revizian komitaton. Laŭ propono de s-ro Ciliga oni decidis, apartigi estonte la kongreskotizon kaj la restadkostojn ĉe IJK. La k-kotizo estu proksimume 10 procentoj de la vivkostoj. Fine estis anoncita estrarkunsido dum la ekskurso al la maro kaj per tio finiĝis la kvara kunsido kaj la jarkunveno je la 18a horo.

Reiter Heinrich p.m.
Prezidanto

Minnaja Nicola p.m.
Sekretario

=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=

La venonta "La Juna Vivo" aperos por la monato Novembro kaj estas dissendota precize komence de la monato. ---

+++NEPRE LEGU LA STATUTOJN++++LEGU LA POSTAJN INFORMOJN+++++

## ADRESOJ DE FUNKCIULOJ KAJ ĈEFPERANTOJ

| Nomo, adreso: | funkcias kiel: |
|---|---|
| REITER Heinrich, Salzburg, I, 557, Austrio/ | Prezidanto, Vojaĝservo, Cefperanto |
| BRONZETTI Giorgio, Via San Martino 8, L'AQUILA, Italio, | Vicprezidanto |
| MINNAJA Nicola, Viale Giulio Cesare 223, ROMA, | Sekretario, Informservo |
| PEYRAUT Yvo, SAINTES (CM) Francio . . . . | Kasisto |
| S-ino E. BURGLER, AMSTERDAM W, Overtoom 435, | Redaktorino |
| VAN SPENGEN Corry, Loosdrechtsweg 55, HILVERSUM Nederlando | Administrantino |
| MARKOVIĆ Milan, BEOGRAD, Rajiĉeva 22/II, Jugosl. | Helpredaktoro |
| BORIŜA Miliĉeviĉ, BEOGRAD, Cvijiĉeva 47/IV, ĜoKoSo, | Honortribunalo |
| CILIGA Paul, 17, rue Duguay-Trouin, PARIS VI^e, | Propagandservo |
| BORSBOOM Eddy, De Cheynstr. 52, DEN HAAG, Nerderl. | Propagandservo |
| HAUDEBINE Madeleine, s-ino, H. Pontoppidansgade 8, AARHUS, Danlando | Kultura servo |
| VAN MOORST Ben, Eenrachtpark 19, BUSSUM (N.H.), Nederl. | Revizoro |
| HOPFENMÜLLER Anton, Finkenweg 7 ASCHAFFENBURG, German. | Revizoro |
| PIETRI Lucien 15 place Collet - MEKNES, Maroko, | Reviz., Ĉefperanto |
| SEKELJ Tibor, Esperanto House, Rickmansworth, Britujo, | Honortribunalo |
| MARINUCCI Giorgio, L'AQUILA, Via Campo Di Fossa 2, Italio | Honortribunalo Ĉefperanto |
| WALLENBURG A. Lobeliastr. 4, HILVERSUM, Nederlando, | Ĉefperanto |
| BRODERSEN Jörgen, Ny Kongevej 41, ODENSE, Danlando | " |
| KRÜGER HUBERT, Eisenbahnstr. 29, BERLIN S.O.36, | " |
| GILLOTEAU s-ino, 8ter Rue de Soubise, cour St. Jean 35, ROUBAIX (N.), Francio | " |
| MOLERA s-ro, Urgalez, Hospital 13, MOJA, Barcelona, Hispan. | Ĉefperanto |
| ANDERSEN Arne, Stulgolan 5, HALMSTAD, Svedio | " |
| RAVŜELJ Jana, Dermotova 29, LJUBLJANA, Jugoslavio | " |

++§§§§§§§§§§§§§§§++

Ĉiuj funkciuloj kaj aliaj anoj estas petataj, informi la respondantajn funkciulojn pri ĉiuj iom gravaj okazaĵoj. Per tio al nia movado estas multe helpata. Pri aferoj rilatante al la tuta TEJO, nepre ankau informu la prezidanton. ------

GRAVAJN SCIIGOJN VIDAU LA VENONTAN PAĜON !!!

ĈIAM PORTU LA STELON !!! PERFEKTIGU VIN LINGVE !!!

Ne forgesu daure propagandi kaj varbi!

Atentu, novaĵo en la historio de TEJO !! TEJO-Skisemajnoj:

Dum tiu ĉi venonta vintro okazos en la montaro de Salzburg du TEJO-skisemajnoj. La unua estos en la tempo de la :

26-a de Decembro 1955 ĝis la 1-a de Januaro 1956

sur la "Felseralm" kaj la dua semajno estos de la :

7-a de Januaro 1956 ĝis la 14-a de Januaro,

sur la "Gottschallalm". Ambau almoĵ situas sur la "Radstädter-Tauern", kiu estas la plej bela skiregiono de la tuta lando Salzburg. La gvidon de ambau semajnoj transprenos amiko R e i t e r Heinrich. La prezo maksimume por la tuta semajno estos 250.- austr. ŝilingoj. Verŝajne ni povos aranĝi ĝin eĉ iomete pli malmultekoste. En la prezo estas enkalkulita la lito kaj plena pensiono kun tri manĝoj. Kiu aliĝas kaj ne venos, devas pagi garantion de 50.- austr. ŝil. Aliĝintoj ricevos specialan cirkuleron kun ĉiuj detaloj (Bonvole aldonu laueble reafrankon!). Karaj geamikoj! La tereno menciita estas tre oportuna por komencantoj de la skiglitado kaj ege varia por skimajstroj! Estas meze en la rokaro, simile kiel sur Gran Sasso D'Italia.

Nepre venu, se Vi havas tempon kaj iom da mono kaj venigu Viajn amikojn. Ankau esperantistoj komencantoj estos bonvenaj.

Anoncu Vin laueble tuj, skribante bone legeble Vian plenan nomon, adreson, aĝon (f-ino au s-ro) kaj profesion.

Mi ĝojas jam nun je interkonatiĝo kaj revido!! -- Anoncoj al:
Reiter Heinrich, Salzburg,I,557, Austrio.

Jen ankorau novaĵo:

T E J O - V A R B I N V I T O

Ĉiu TEJO-ano estas invitata kaj nepre petata, partopreni jenan varbkampanjon:

Ĉiu TEJO-an(in)o, kiu varbas minimume unu novan an(in)on (kotizo pojare estas 3,50 ned. guldenoj), ricevos dum la venonta IJK en speciala festakto "Humorstilan atestilon" pri sia varbagado kun enskribita nombro de la varbitoj. La atestilo estos subsignita de la prezidanto, la OVO-geprezidantoj kaj la administrantino. Dum la venonta IJK estos premiataj la kvin plej sukcesplenaj varbintoj, ankau se ili ne povos ĉeesti la kunvenon, krome loterio decidos pri diversaj aliaj premioj kaj humoraj distingoj.

Estas grava serenaĵo. Do nepre jam nun komencu varbi kaj ne plu ĉesu dum la tuta jaro, ĉar ni tre ĝojus, se ĝuste Vi estus la ĉefpremiito. Precizajn adresojn de novaj anoj sendu al:
TEJO-administrantino, f-ino Corry Van S p e n g e n. Adreson vidu supre au en unu numero de "La Juna Vivo". Multan sukceson!!

REGULARO DE

TUTMONDA ESPERANTO JUNULAR-ORGANIZO (TEJO)

---

§ 1. NOMO: La nomo de la organizo estas TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO ( T E J O ).

§ 2. CELO: TEJO celas:

a/ Konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin pere de:

1) Propagando kaj instruado de la Lingvo Internacia Esperanto inter la junularo de la tuta mondo.
2) Aranĝado de internaciaj renkontiĝoj.
3) Legado de la komuna gazeto "La Juna Vivo".
4) Korespondado en Esperanto.
5) Ĉiuj indaj rimedoj por interfratigi homojn de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj.

b/ Akceli, ke Esperanto estu akceptata en la lernejoj.

§ 3. KARAKTERO: TEJO estas supertendenca rilate al la diferencoj, nomitaj en la paragrafo 2. a/ 5).

§ 4. MEMBRECO: TEJO havas jenajn kategoriojn de membroj:

a/ Membroj aktivaj (de 14 ĝis 3o jaroj).
b/ Membroj aspirantaj (de 6 ĝis 14 jaroj).
c/ Denaskaj esperantistoj (ekde naskiĝo ĝis 6 jaroj).
ĉ/ Membroj subtenantaj (pli ol 3o jaroj).
d/ Membroj simpatiantaj.

Membro aspiranta, aktiva kaj subtenanta povas esti esperantist(in)o au lernanto de Esperanto, konsentanta pri la celo de TEJO.

Membro simpatianta povas esti ĉiu, kiu konsentas pri la celo de TEJO.

Personoj, kiuj estas elektitaj por iu funkcio en TEJO, estas rigardataj kiel aktivaj membroj.

La membroj pagas la jarkotizon kaj ricevas senpage la gazeton "La Juna Vivo". Oni povas ankau aboni la gazeton, ne estante membro.

§ 5. SEKCIOJ,GRUPOJ,FAKOJ: Individuaj membroj povas agadi kolektive, se la funkciado de la Organizo sur iu ajn tereno igas tion bezonata. Por ĉiu sekcio, grupo au fako

validas senŝanĝe la ĝenerala regularo. Ili ne havas apartajn estrarojn, sed formas laubezone plenumkomitatojn.

§ 6. POSTENOJ. TEJO Havas: Estraron, ĉefperantojn, perantojn, funkciulojn por specialaj servoj.

La estraro estas elektata de ĝenerala Jarkunveno au per ĝenerala referendumo. Ĝi konsistas el minimume 9 (nau) personoj, nome: Prezidanto, vicprezidanto, sekretario, laubezone vicsekretario, 2 (du) kasistoj, ĉefa redaktoro, respondecantoj-funkciuloj de specialaj servoj kaj Ĝenerala Kunvena Sekretario (ĜKS). La tuta funkciularo estas elektata au reelektata dum ĉiu Jarkunveno. La Jarkunveno havas la rajton, eksigi la Ĝeneralan Kunvenan Sekretarion. La Jarkunveno havas la rajton, eksigi siajn ne aktive laborantajn funkciulojn. Ĉiu funkciulo deziranta eksiĝi devas anonci tion almenau duonjaron antaue. Se iu estrarano eksiĝas, la ceteraj rajtas elekti la anstatauanton, kiu funkcias ĝis la plej proksima Jarkunsido au Referendumo.

Ĉefperantoj konsistigas la Perantan Konsilantaron kaj havas la taskon, gvidi la movadon en siaj landoj kaj interkonsiliĝi kun la estraro de TEJO.

Ĉefperantoj: En ĉiu lando TEJO havas ĉefperanton, kiu plenumas la organizan taskon en la koncerna lando. Li estas elektata de la membroj de la lando kun aprobo de la TEJO-estraro. Se necesas, la estraro elektas la ĉefperanton. En landoj kie estas pli ol 5o (kvindek) membroj, oni elektas almenau 4 (kvar) personojn, kiuj formas kun la ĉefperanto la plenumkomitaton. Ĉiu komitatano havas parton de la ĉefperanta tasko sub prezido de la ĉefperanto.

PERANTOJ: En ĉiu loko au regiono TEJO havas peranton. Ili estas elektataj de la membroj en la koncerna loko au regiono kun aprobo de la ĉefperanto. Se necese, la ĉefperanto elektas la peranton kun aprobo de TEJO-estraro. La Estraro havas la rajton elekti lokajn au regionajn perantojn, se tie ne ekzistas ĉefperanto.

RIMARKO: La lokaj au regionaj perantoj povas sendi la monon rekte al la kasistoj de TEJO, sed samtempe ili devas forsendi detalan primonan raporton ankau al la ĉefperanto.

La elekto de funkciuloj por specialaj servoj dependas de la karaktero de la funkcio, kaj okazas kiel la elekto de Estraro, ĉefperanto au peranto.

Ĉiuj funkciuloj estas aparte elektataj de la Jarkunveno. Sekve ili funkcias nur unu jaron, krom la ĜKS, konstante funkcianta.

§ 7. Ĉiuj organizaĵoj, entreprenoj au institucioj, kiuj konsentas pri la celo de TEJO, povas aliĝi samkondiĉe kiel "Simpatianta Organizo, Entrepreno au Instituçio".

§ 8. ADMINISTRA JARO: La administra jaro dauras de la unua de Julio ĝis la trideka de Junio.

§ 9. BALOTADO, REFERENDUMO: Ĉiuj membroj havas la rajton voĉdoni. Referendumo okazas laubezone laŭ decido de la estraro.

§ 1o. KUNVENOJ: Ĉiujare okazas Internacia Junular-Kunveno, kiu havas festan kaj propagandan karakteron. Dum tiu Kunveno okazas la labora Jarkunveno por solvi diversajn problemojn por estonta agado.

Landaj, regionaj au lokaj kunvenoj okazas lau decido de la ĉefperanto, perantoj au organizantoj kun konsento de TEJO-estraro.

Dum la Kunvenoj estas organizataj diversspecaj konkursoj (lau ebleco), pere de kiuj estas premiataj la plej kapablaj partoprenantoj. - Ĉe[illegible] jenaj: Sporto; literaturo (originaloj kaj tradukoj); teatro (originaloj kaj tradukoj); folkloro; paroladoj ks.

§ 11. ALIĜO KAJ EKSIĜO: Oni povas aliĝi je ĉiu dato kaj pagas sian kotizon ĉe la aliĝo, sed almenau por la tuta jaro, de la unua de Julio ĝis la trideka de Junio.

§ 12. LA JARKOTIZOJ estas jenaj:

a/ Membroj aktivaj kaj subtenantaj pagas la jarkotizon de guld. 3,5o (tri kaj duono).

b/ Ĉiuj aliaj membroj pagas la duonon de la jarkotizo, ne ricevante la gazeton "LJV".

c/ Subtenantaj kaj simpatiantaj organizoj, entreprenoj kaj institucioj pagas guld. 1o (dek) ĉiujare.

La perantoj au sekcioj retenas por siaj laborbezonoj 1o % (dek procentojn) de la kotizoj.

La aliĝkotizo al la Kunvenoj estas apartigita de la restadkostoj; ĝi sumas 1o % (dek procentojn) de la proksimumaj restadkostoj.

§ 13. KONTROLO: La ĝenerala labora Jarkunveno elektas Revizian Komitaton, kiu konsistas el tri personoj. Revizia Komitato

devas trarigardi la kasostaton antau la jarkunveno kaj fari oficialan skribitan raporton al la jarkunveno mem. Se la kasdokumentoj ne estas en ordo, Revizia Komitato ekagas kontrau la kasistoj.

Memstaraj perantoj au sekcioj devas havi kasolibron kaj fakturojn pri la elspezita mono.

§ 14. La Jarkunveno elektas Honoran Tribunalon, kiu konsistas el tri membroj. Honora Tribunalo devas reguligi la justan agadon de funkciularo kaj membraro. Siajn decidojn pri la plendoj ĝi prezentas rekte al la jarkunveno, kiu faras la finan decidon.

La Jarkunvenoj de la landaj TEJO-sekcioj elektas siajn Reviziajn komitatojn, kiuj kontrolas la funkciadon de la sekcia kasostato.

§ 15. ORGANO: La oficiala organo de TEJO estas "La Juna Vivo". Ĝia celo estas simila al la § 2. a/. Ĝin prizorgas kaj distribuas la Redakta Komitato, konsistanta el tri personoj. La Jarkunsido decidas pri la formo kaj enhavo de "La Juna Vivo".

TIU ĈI REGULARO ESTAS AKCEPTITA DE LA JARKUNVENO LA 11an DE AUGUSTO 1955. La originalo portas la subskribojn de la estraranoj.

- o : O : o -